06.049.2.053.7„1952.08"(482.1) : 30 : 408.92

## INTERNACIA KOMISIONO „ESPERANTO KAJ SOCIOLOGIO" (I.K.E.S.).

Resuma raporto pri ĝenerala *kunveno* okazinta la *8*-an de *aŭgusto '52* en Universitato *Oslo* dum la 37a universala kongreso de Esperanto.

La prezidanton de la komisiono, D-ron William Solzbacher (Usono), anstataŭas D-ro Gaetano Campetti (Italujo); sekretario S-ro Cornelis Keur (Nederlando).

Tagordo:

1. Malfermo.
2. Ricevitaj komunikoj; Aranĝoj.
3. Protokolo de la kunveno de aŭg. '51.
4. Jarraporto 1951/'52.
5. Laboro en la periodo '52/'53.
6. Aliaj aferoj; Ronddemando.
7. Fermo.

1. La celo de I.K.E.S., koncize formulite, estas la jena:

a. Progresigi la praktikadon de Esperanto inter ĉiuj kiuj okupas sin pri sociologio, science, esplore aŭ aplike;

b. Kontribui al la aplikado de sociologio por la Esperanto-movado.

c. Kunlabori en kadro de ekzistantaj Esperanto-organizoj por la celoj menciitaj;

d. Helpi al internaciaj rilatoj en sociologia tereno.

2a. D-ro Solzbacher skribas al la komisiono: „Mi estas kun vi en spirito kaj en sincera sindono al nia komuna celo, kaj mi deziras al viaj studoj en Oslo plenan sukceson. Laŭ mia opinio nia komisiono, kiu ĝis nun estas nur modesta entrepreno en komenca fazo de evoluo, povos fariĝi tre grava por la progreso de Esperanto kaj por estonta evoluo de la sociologio. Estas evidente, ke la lingvo estas grava socia fenomeno. Interhomaj rilatoj ne estas eblaj sen lingvo, kaj homaj socioj ĉiuspecaj estas influataj de lingvaj faktoroj kaj reciproke ekzercas influon al la lingva evoluo.

Eble mi mem, estante unu el la malmultaj personoj, kiuj estas samtempe profesiaj sociologiistoj kaj profesiaj lingvistoj, estas iomete kompetenta por paroli pri tio. Se lingvo kaj socio en ĉiu kazo prezentas gravan interrilatan problemon, ni povas diri kun eĉ pli da certeco, ke internacia lingvo kaj internacia socio estas treege gravaj unu por la alia. Esplori tiun interrilaton kun scienca objektiveco kaj gajni konkludojn el tiu esploro, estos grava, kvankam malfacila, tasko por la sociologio. Nia komisiono devos esti preta doni teorian kaj praktikan helpon por tiu celo."

Prezidanto D-ro Campetti esprimas sian ŝaton pro la kompetentaj kontribuoj de D-ro Solzbacher en la evoluo de la komisiona afero kaj pro lia preteco resti prezidanto malgraŭ plenaj okupoj ankaŭ en diversaj aliaj Esperanto-sektoroj.

b/g. S-roj William A. Gething (Britujo); José Guzman, Antonio-Marco Botella (Hispanujo); Benedicto Silva, Pedro Simon (Brazilo); kaj Mitumasa Okada (Japanujo) letere salutas la komisionon, esprimante bedaŭron pro foresto sekve de okupo aŭ distanco.

h. La novaj respondantoj al la alvoko de la komisiono estas nome menciataj kaj tiuj, kiuj deklaris sin pretaj kunlabori, estas instalataj.

i. La sekretario de la komisiono estas ŝarĝita en la labor-periodo 1951/'52, laŭ invito de Prof. D-ro Ivo Lapenna, honorofica direktoro de la Centro de Esploroj kaj Dokumentado de U.E.A., de enkonduka esploro koncerne la socian konsiston de la Esperanto-movado, kiu studo forprenis multe da tempo de la sekretariejo de la komisiono.

3. & 4. La protokolo de la ĝenerala kunveno de la 10-a de aŭgusto 1951 kune kun la jarraporto 1951/'52 estas aprobataj.

5. Por la nova laborperiodo jenaj proponoj estas aprobataj:

a. Atenti pri la programo resumita en la raporto de la kunveno 10.8.1951 en Munkeno (Vidu *„Scienca Revuo"*, junio 1952, paĝo 18).

b. Diskonigi la ekziston kaj celon de la komisiono en la Esperanto-movado (daŭrigo de la jam komencita laboro).

c. Diskonigi la ekziston kaj celon de la komisiono en sociologiaj revuoj kaj enciklopediaj verkoj (ĵus aperis en Usonaj sociologiaj revuoj kaj en la enciklopedia verko „Nova internacia jarlibro" — *The new international yearbook 1952* — artikoloj pri Esperanto kun atentigo pri I.K.E.S.).

d. Publikigo de artikoloj pri sociologiaj temoj en la Esperanto-gazetaro (Jam aperis kelkaj en *Scienca Revuo*).

e. Publikigo de artikoloj verkitaj en Esperanto kaj de Esperanto-resumoj de artikoloj verkitaj en aliaj lingvoj, en nacilingvaj sociologiaj revuoj kaj libroj.

f. Daŭrigo de studoj kaj enketoj pri la socia konsisto de la Esperanto-movado.

g. Ne nur al la landaj asocioj, kiel jam farite, sed ankaŭ al la delegitoj de U.E.A. estu sendotaj invitoj diskonigi la celadon de I.K.E.S.

h. Pri la kunlaborantoj de I.K.E.S. adreslisteto estu disponigata al interesiĝantaj fakuloj por etendi la laborterenon kaj krei kontaktojn internaciajn.

i. En venontaj kunvenoj, en universala kongresa kadro, estu pritraktotaj, krom organizaj kaj komisionaj aferoj, ankaŭ kelkaj temoj en la sociologia kaj sociala kampo de ĝenerala intereso kiel koncizaj fakaj enkondukoj.

6a. Por servi al la „Socia dokumentado pri la anaro" la sekretario pritraktis tiun temon en la Unua kongressekcio (Organizo- kaj Instruado-aferoj); en la Dua kongressekcio (Scienco kaj Tekniko) li raportis pri la ĝisnuna rezulto en la enkonduka esploro koncerne la socian konsiston de la Esperanto-movado.

La komisiono rekomendas speciale la proponitan ideon: utiligi pli profunde la jam ekzistantajn bazajn donitaĵojn en la administracioj de la landaj asocioj kaj en iliaj sekcioj, ordigante tiujn donitaĵojn, daŭre grupigante ilin statistike kaj kompletigante ilin tiel bone kiel eble. Tiurilate la estraroj estu adekvate organizotaj.

b. Interesiĝo evidentiĝis pri socia studo kaj folkloro, popollegendaro, tradicio-rakontoj (Japanujo: s-ro N. Hayakawa, ano de I.K.E.S., pri japana kaj aina folkloro, precipe en interrilato kun iliaj soci-ekonomiaj vivmanieroj; Finnlando: s-ro V. Setälä pri la riĉenhava finnlanda legendaro; Nov-Zelando: D-ro J. Hamvai, UEA-delegito pri folkloro; eble ankaŭ en Jugoslavujo ekzistas esperantista atento pri la temo).
Ĉu eblas siatempe publikigi internacian verketon en tiu kampo?

c. Utile estas instigi al internacia korespondo inter tiuj, kiuj profesie aŭ alifunkcie interesiĝas pri specialaj sociaj kaj socialaj temoj. Por tio la oficejo de la komisiono servu kiel centro de atentigo kaj interŝanĝo en kontakto kun U.E.A.

7. Fermo de la kunveno kaj adiaŭo.

378.18.06 = 089.2 : 061.23(489) : 378.18.067.1„1953"

## DENOVE INTERNACIA ARKEOLOGIA TENDARO EN DANLANDO.

**Dana Ŝtato donis dum la 4 lastaj jaroj 25.000 d. kr. al arkeologiaj tendaroj por esperantistaj studentoj.**

DANA INTERNACIA STUDENTKOMITATO aranĝos kunlabore kun Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejanoj denove internacian arkeologian tendaron.

Pasintjare tre malmultaj aliĝis, sed ĉar la pago ĉi-jare estas reduktita ĝis nur 20 d. kr. (= 3 us. dolaroj), oni atendas multajn partoprenantojn. La tendaranoj elfosos vikingan fortikaĵon apud urbo Hobro en Nordjutlando. La aranĝo komenciĝos la 13-an de julio. Tiun tagon la partoprenantoj alvenu Kopenhagon. Vespere okazos interkona kunveno en Studenta Esperanto-Klubo, kaj la sekvantan tagon oni vizitos vidindaĵojn en Kopenhago, i.a. oni vizitos Nacian Muzeon, kaj tie okazos prelego en esperanto pri la rezultatoj de dana arkeologio. Vespere vizito al Tivoli — fama amuzejo en Kopenhago, kaj pli poste forveturo al Jutlando — kaj la vojaĝo inter Kopenhago kaj Hobro, tien kaj reen, estas enkalkulita en la prezo — kie la arkeologia laboro komenciĝos. Oni laboros 6 horojn tage, loĝos kaj manĝos en hotelo. Ofte okazos prelegoj kaj ekskursoj. La naturo en la ĉirkaŭaĵo de Hobro estas belega, kaj bona banstrando estas tre proksima. La 4-an de aŭg. la tendaro finiĝos. Partoprenantoj, kiuj tion deziras, povos post la tendaro viziti la internacian studentcentron **„Hald"** apud urbo Viborg. Kvartaga restado tie — inkluzive de vojaĝo de Hobro al Hald, tien kaj reen, kostos 73 d. kr.

Ĉiuj gestudentoj, altlernejanoj (studintoj), seminarianoj, k.s. povos partopreni la tendaron. Oni postulas ke la partoprenantoj flue parolu esperanton. Sed estas tre grave ke interesatoj **tuj** aliĝu. Se ne almenaŭ 15 partoprenantoj aliĝis antaŭ la 15a de majo, la tendaro ne okazos.

La dana ŝtato donis dum la lastaj 4 jaroj 25.000 d. kr. (= 3500 us. dol.) al tendaroj por esperantistaj studentoj, kaj estus domaĝe se tia aranĝo pro manko de partoprenantoj ne povus esti daŭrigata.

Do pripensu ĉu ne vi povas ion fari por stimuli la intereson por la 4a internacia arkeologia tendaro por esperantistaj studentoj.

Petu senpagan programon de DANA INTERNACIA STUDENTKOMITATO, La Universitato, Sct. Pederstræde 19, Kopenhago K.

656.7 : 378.18.06

**Malmultekostaj flugvojaĝoj por Studentoj.**

SKANDINAVA SERVO DE STUDENTVOJAĜOJ, Sct. Pederstræde 19, Kopenhago K. — branĉo de DIS, aranĝos venontsomere multajn flugvojaĝojn. Oni flugos inter Kopenhago kaj jenaj urboj: Parizo, Munkeno, Londono kaj Ĝenevo, krome inter Parizo kaj Barcelono kaj inter Londono kaj Parizo. La biletprezoj estas ege malaltaj — ili kostas la samon kiel 3-a klasa vojaĝo fervoje, ekz. flugvojaĝo inter Kopenhago kaj Parizo kostas 160 d. kr.

Studentoj (eventuale kune kun edzino kaj infanoj) kaj junaj altlernejanoj (studintoj) povos partopreni la flugadon.

Petu detalajn informojn esperante ĉe supre menciita adreso.



378.18.06 = 089.2 : 061.23(489)

**Jarkunveno de Esperanto-Federacio de Danaj Altlernejanoj.**

EFDA aranĝos jarkunvenon en Kopenhago pentekoste. Komenciĝo: la 23-an de majo, vespere. Lasta aranĝo: vizito al Reĝa Teatro la 25-an de majo, vespere. Prelegoj pri kulturaj temoj, diskutoj, balo, ktp.

Eksterlandaj studentoj kaj altlernejanoj povos senpage ricevi kongreskarton, kaj ni povos — se vi frue aliĝos — aranĝi malmultekostan restadon.

Petu senpagan programon de EFDA, Laksegade 35, Kopenhago K.

378.18.06 = 089.2 : 061.23(100) : 061.32(100) (497.12)„1953.08"

## INTERNACIA KONFERENCO POR ESPERANTISTAJ STUDENTOJ KAJ ALTLERNEJANOJ EN LJUBLJANA, AŬGUSTE 1953.

Pasintsomere okazis en Schluchsee, Germanujo, la unua internacia konferenco por esperantistaj studentoj kaj altlernejanoj (studintoj). Ĝi estis sukcesa, kaj nun la nova organizaĵo „Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejanoj" — IFESA denove invitas al simila konferenco.

Ĝi okazos en Ljubljana, la ĉefurbo de Slovenujo, de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1953.

Jenaj temoj estos pritraktataj: Studmanieroj kaj stud-eblecoj ĉe diverslandaj universitatoj, kolegioj kaj altlernejoj, Stud-eblecoj por eksterlandaj studentoj en la diversaj landoj, Kio estas farata por ke la studado ĉe universitatoj k.s. ne fariĝu tro faka?, La funkciado de esperantaj katedroj dum 1952/53 kaj aktiveco de esperantistaj studentaj organizaĵoj dum 1952/53.

Krome okazos serio de prelegoj pri kulturaj temoj, ekskursoj, balo, ktp.

Partopreno kostos 12 us. dolarojn aŭ egalvaloron, kaj interesatoj povas peti senpagan programon de IFESA, Laksegade 35, Kopenhago K. Danlando.

378.245 (C. A. ten Seldam)

**Elkorajn gratulojn** ni direktas al **nia membro** amsterdama, **s-ro C. A. ten Seldam,** kiu la 16-an de marto en Utreĥto **doktoriĝis kun laŭdo** per disertaĵo pri *„Energies and polarizabilities of compressed atoms"* (Energioj kaj polarizebloj de kunpremitaj atomoj). La 75-paĝa anglalingva disertaĵo temas pri teorie fizika laboro. Ĝin akompanas 7-paĝa esperantlingva resumo, identa kun la unua ĉapitro de la disertaĵo, kaj iom pli ol dupaĝa nederlandlingva resumo.

El la tezoj de d-ro ten Seldam la lasta (11-a) tekstas: „Kiel internacia trafika lingvo - ankaŭ en la scienco — *Esperanto* estas preferinda ol *Interlingua,* propagandata de IALA."

**Korektigoj:** 655.255

4 99, tuj sub la mezo, oni legu: CL $= \varepsilon_0 \mu_0 s^2$ ...... (1).
4 114, la 4-an linion super la piednoto oni legu jene:
Kaj *el* ĝi, simile al vento dezerten siblanta,